

Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • Bimonthly bulletin 2010:1 (jan–feb)



HOSS + IROOZNA

ARE aranĝis ariĝon arbaran (pĝ. 6)

Ankaŭ ĉi-numere: Instruado: *La Cseh-metodo* • Intervjuo kun Arika OKRENT • Solenaĵoj por la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof • Traduku: *Dialektaj dilemoj* • Poemo el Ĉeĥujo • kaj pli...

Usona Esperantisto

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 49, No 1 — 2010:1 (jan–feb)

Redaktisto • Editor: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ bulteno@esperanto-usa.org

➔ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester, NY 14627-1205, USA

Usona Esperantisto is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, a photo of your face, and your email/postal address. With photos please include the name of photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

You may reprint content from this newsletter if you give credit; please send a copy of any reprinted material to the address above. Opinions expressed in this publication are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.

Usona Esperantisto estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, vizaĝofoton kaj (ret)poŝtadreson. Kun fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, la loko, kaj la nomoj de la foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Oni rajtas reaprigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzempleron de ajna republikigita materialo. Opinioj esprimitaj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.



**esperanto
usa**

Centra Oficejo • Central Office

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

Direktoro • Direktoro, CO: William B. HARRIS

Prezidanto • President: Philip G. DORCAS

Vicprezidanto • Vice President: Tim WESTOVER

Sekretario • Secretary: Julie SPICKLER

Kasisto • Treasurer: ???

Aliaj estraranoj • Other board members: Jenja AMIS, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, Anjo HARLOW, ROS Haruo, Tor KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie WINBERG, Christopher ZERVIC

Iomete frua salto novjaren

Atentaj legantoj rimarkos la mankon de numero 2009/6. Ne temas pri poŝtproblemo, sed pri abrupta ŝanĝiĝo en la aperoritmo. Ni ankoraŭ eldonos po ses numerojn jare, sed por ke la serio de 2010 komenciĝu en januaro, estis necese transsalti unu numeron. Pardonon pro ajna konfuzo, kaj bonan legadon! —*La redaktisto*

Notoj de la Direktoro

Finfine la translokiĝo de la Centra Oficejo estas finita, kaj restas nur la ĉiutagaj, kutimaj taskoj. Dum la venontaj monatoj mi aldonos pli ol 100 librojn al la retbutiko en la kategorio “used books”. Por trovi ilin, iru al **Books → Used Books**.

Pro la translokiĝo, mi intence prokrastis la remendon de libroj por la retbutiko, kaj rezulte kelkaj titoloj estas elĉerpitaj. Mi lastatempe remendis multajn, kaj nun mi atendas la alvenon de la varoj, kiuj venas de diversaj landoj.

Estas nun la sezono por realiĝado kaj reabonado. Membreco en Esperanto-USA nun estas 12-monata, kaj ne rilatas al specifa jaro. Kontrolu la koverton en kiu alvenis ĉi tiu numero de *Usona Esperantisto*: sur la etikedo vi trovos la daton kiam via nuna membreco finiĝos. Kontraste, membreco en UEA kaj abonoj al revuoj restas laŭjaraj, kaj oni ricevas realiĝ-ilon/reabonilon en novembro.

Pri la revuaj statusoj, estas kaj bona kaj malbona novaĵoj. La malbona estas, ke la revuo *Komencanto* ne aperos papere en 2010. Mi ne scias, ĉu ĝi estos havebla rete aŭ ne. La bona novaĵo estas, ke ni ofertas novan revuon, *Medicina Internacia Revuo*, la oficiala Organo de la Universala Medicina Esperanto-Asocio. Ĝi aperas du fojojn jare.

—Bill HARRIS

We need you! Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly newsletter, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: _____

Address: _____

City & State: _____

Postal code & Country: _____

Phone & Fax: _____

E-mail: _____

Birthdate (M/D/Y): ____/____/____ Ham radio call: _____

In the member list, don't publish my: address phone fax email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto \$10.00
(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)
- Youth *(you must be under 27)* \$20.00
- Limited Income \$20.00
- Individual \$40.00
- Family \$60.00
- Sustaining \$80.00
- Life *(birthdate required)* \$800.00

Credit card info: Visa Mastercard

Number: _____ Expires(M/Y): ____/____

Ĉu vi partoprenos en la 95-a UK?



Flugoj al Kubo el Usono ne estas permesataj por ordinaraĵoj ĉar ni “ne rajtas komerci kun la malamikoj” en Kubo. (Kun aliaj landoj, jes, sed ne kun Kubo.) Kvantkam multaj opinias tiun leĝon malsaĝa, kaj eble ĝi ne daŭros longe, ĝi ŝajne ne ŝanĝiĝos sufiĉe frue por aranĝi pli bonajn, pli malmultekostajn planojn. Pro tio, *Esperanto Vojaĝ-Servo* ricevis inviton aranĝi antaŭ- kaj post-kongresojn en Meksiko. Ni nun organizas la jenajn programojn:

Antaŭkongreso – Meksikurbo 12–16 julio

Programo inkluzivos interkonan vesperon kaj eblon amikiĝi kun alilandanoj, muzikajn kaj kulturajn programojn kaj turistajn ekskursojn:

- Vizito al mondfama Antropologia Muzeo
- *Ballet Folklórico* en la belega Palacio Belles Artes
- *Xochimilco* kaj ties flosantaj ĝardenoj
- Universitato kaj lokoj spekti artaĵojn de Diego RIVERA kaj Frida KAHLO

Speciala grupa-flugo/prezo al la UK, tien kaj re-en, pagotaj en usonaj dolaroj.

Universala Kongreso en Havano 17–25 julio

Nepre aliĝu nun, antaŭ prezoj altiĝos. Via aliĝo helpas la laboron de UEA en Roterdamo eĉ se vi ne povos korpe partopreni. Eblas pagi per kredit-karto aŭ rekte el via konto ĉe UEA, en eŭroj. Se vi bezonas paperan aliĝilon, petu de *Esperanto Vojaĝ-Servo* (adreso sube).

Internacia Junulara Kongreso 24–31 julio

aŭ

Kolonia Cirklo 25–30 julio

Programo inkluzivos busekskursojn tra historie riĉaj lokoj kiel *Queretaro*, *San Miguel de Allende*, *Guanajuato*, *Guadalajara* kaj *Tlakepake* kaj reveno al Meksikurbo por trafi flugojn hejmen.

Prezoj estos haveblaj fine de januaro, kaj ni jam havas specialan grupo-prezon por la flugo al la UK kaj por 3- aŭ 4-stela hotelo tie – pagota en usonaj dolaroj! Vi devas aliĝi per eŭroj, sed por niaj aranĝoj faritaj en Meksiko, ni rajtas pagi en dolaroj – kiu savos al ni multe da mono ŝanĝante niajn valutojn en eŭrojn.

Por diskuti aŭ ricevi plej lastajn informojn, nepre kontaktu:

Esperanto Vojaĝ-Servo

1824 Euclid Avenue

Berkeley CA 94709

tel.: 510-531-8393

fakso: 510-531-0152

LusiHarmon@esperanto.org



PSI Printempa Semajno Internacia

La Germana fonduso *Fondaĵo de Familio Fischer* (FFF) ofertas subvencion al subtenindaj familioj por partopreni en la Printempa Semajno Internacia (PSI), de la 2-a ĝis la 9-a de aprilo en Sankt Andreasberg, Germanujo. Familioj estas subtenindaj, se sen subvencio ili ne povus pagi la partoprenon. La subvencio povas ampleksi parton aŭ tuton de la kotizoj inkluzive loĝadon kaj manĝojn. Kandidatoj bezonas rekomendon de sia nacia Esperanto-organizo. Sinproponojn oni direktu al la prezidanto de FFF, s-ino Hedwig FISCHER, ĉe <fischerh@uni-muenster.de>. Aŭ vizitu la retejon de PSI: <<http://esperanto.de/psi/>>.

Forpasoj

Melvin LONG

Melvin LONG estis dumviva membro de Esperanto-USA kiu mortis en septembro pro kancero. Oni povas sendi kondolencon (bv. nur angle) al lia filino Cindy LONG, ĉe <cj.long@comcast.net>.

Charles SIMON

Forpasis la 9-an de junio, en Beachwood, Ohio. Li havis 93 jarojn. Doktoriginte ĉe la universitato Case Western Reserve, Charles servis en la usona armeo de 1942–1946, studis la francan lingvon ĉe la *Sorbonne* (kaj instruis Esperanton tie), kaj dum jardekoj instruis lingvojn en publikaj lernejoj de Cleveland Heights (Ohio).

Laŭ kolego Waltraut ZIMMERM, li estis “sindediĉa instruisto kiu inspiris min. Li estis ankaŭ prizorgema kaj malavara homo kun granda koro.” Laŭ filo Ralph SIMON, “Li estis ege humanisma. Li forte volis, ke homoj komprenu unu la alian.”

Charles estis agema kaj influa esperantisto en Cleveland Heights ekde sia junaĝo. Li estris komitaton kiu organizis la Landan Kongreson de EANA en 1938, kaj en tiu sama jaro li organizis serion de klasoj instruitaj de Lidia ZAMENHOF. La kuroj tiel sukcesis, ke la grupo klopodis helpi al Lidia pluvalidigi ŝian vizon... sed vane, kiel oni nun scias. Ŝi devis reiri al Pollando, kie ŝin murdis la nazioj.

Membro Michael CUDDY Jr. skribis, “Surprizis min vidi la rezultojn de la balotado [lastatempe en la retejo de E-USA] kiuj indikis, ke multaj esperantistoj ne persone konas unu la alian. Mi estis inter tiuj, ĝis kiam mi ekkorespondis kun d-ro Simon. Post niaj leteroj sekvis interŝanĝo de libroj, konversacioj per telefono, kaj finfine renkontiĝo en Buffalo en 2007. Mi sentis min privilegiita esti lia amiko. (*Danke al raportoj de Michael CUDDY Jr. kaj la gazeto Cleveland Sun Press.*)

Volas korespondi

Mi estas 28-jara, blanka, alta viro. Mi estas komencanto. Mi deziras korespondi kun interesa virino.

Lucas Alan DIETSCH #504624
Stanley Correctional Institution
100 Corrections Dr
Stanley WI 54768

ARE sukcese arigis

Raportis Steve BREWER

En oktobro okazis la 16-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto ĉe Lake George en Novjorkio. Kunvenis iom pli ol kvindek samideanoj el la nordoriento, iom pli da homoj el Usono ol el Kanado. (Ni gajnis en la konkurso!) Estis bela semajnfino por kunveni kun malnovaj amikoj kaj ekkoni novajn.

Pli ol kvarono de la partoprenantoj estis novuloj. Venis kvin studentoj de Hampshire College en Amherst, Masaĉuseco. Inter la partoprenantoj estis ankaŭ Esther SCHOR, profesoro de Princeton kiu verkas libron pri la Esperanto-movado, novaj estraranoj de E-USA Julie WINBERG kaj Tor KINLOK, kaj Jakobo SCHWARTZ, estro de la kandidatiga komitato.

Okazis kelkaj elstaraj prelegoj. Francisko LORRAIN prelegis pri Latino kaj Esperanto kiel internaciaj lingvoj. (Ĉu vi scias, kiuj aliaj lingvo-nomoj finiĝas per -o?) Ron GLOSSOP prelegis pri siaj aventuroj en Ĉinujo. Nijl BLONSTEIN parolis pri konferenco por ne-registaraj organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj. Argilo SMITH prelegis pri ĉifroscienco. La plej interesa prelego estis tiu de Tomaso ALEXANDER, kiu traktis la pakuan lingvon – kreita lingvo de simihomoj en televida programo “Lando de la Perditoj”, kiu aperis en la 1970-aj jaroj.

Dum la unua vespero, Steve BREWER kaj Hoss FIROOZNA gvidis mallongan enkondukon al nudokula astronomio. Oni vidis Jupiteron kaj plurajn aŭtunajn konstelaciojn – kaj pro manko de urba lamplumo, eblis klare vidi ankaŭ la Laktan Vojon. Poste ni longe kantis kaj rakontis ĉirkaŭ fajro.

Okazis ankaŭ la kutimaj eventoj: literatura horo por priskribi interesajn kaj aĉetindajn librojn; oratora horo por tiuj, kiuj volis prelegi mallonge por ekzerci sin al parol-kapablo; amikeca vespero por ekkoni unu la alian; kaj kultura vespero por muziko, deklamado, kaj ĉi-specaj amuziĝoj. Por mi la plej ŝatata estis la “krokodilanta ĵonglisto” de Tomaso, kiu blasfemetis en la angla kiam ajn li fuŝis la ĵongladon. La senlacigeblaj Normando FLEURY kaj Zdravka METZ laboris multe por okazigi ĉion, interalie gvidante botanikan ekskurson al apuda montopinto (*vidu kovrilfoton*).

Kompreneble, la plej gravaj momentoj estis tiuj, kiam oni babilis kaj vere interkonatiĝis kun la aliaj partoprenantoj.

Bedaŭrinde mi devis mistrafi la lastan tagon kaj foriris antaŭ la sunleviĝo lundon matene. Dum mi veturis suden, mi vidis la leviĝon de Venuso kaj Merkuro kaj, finfine, la suno, super la montoj kaj arbaroj. Plua bela tago en Esperantujo.



Sherri WALES kaj Tor KINLOK esploras padojn apud la gastejo. (Foto danke al Steve BREWER)

Instruvojaĝo al Ĉinujo

Dum aŭgusto 2009, kvar urboj en Ĉinujo gastigis profesoron Ron GLOSSOP por helpi instrui Esperanton, aparte al infanoj. Ron estas emerita profesoro de filozofio kaj pac-studo, kaj direktoro de *Infanoj ĉirkaŭ la Mondo*: <<http://icxlm.org>>. Dum la vojaĝo li instruis en elementa lernejo en Taiyuan, en mezlernejo kaj publikaj parkoj en Wuhan, en infanĝardeno en Nanĉang, kaj en universitato en Harbin.

Ĉefa instruilo estis la *Kanto de la Koloroj* (alinome *Ruĝa Pomo* – la temo de la unua strofo), kiu uzas la konatan francan melodion “Frato Jako”. La strofoj instruas pliajn kolorojn, kaj la lasta traktas la bazan ideon de Esperanto: “Sur la Tero, bela Tero, Loĝas ni, kantas ni, Kune sur la Tero, Monda familio.” Lerninte la kanton, oni konversaciis pri demandoj rilate la kolorojn. Ili lernis kaj interparolis ankaŭ pri numeraloj ĝis mil, kaj pri legado de horloĝoj.

Ĉinaj esperantistoj afable prizorgis “profesoron Ron” dum la kvar-semajna vizito ĉar li ne scipovas la ĉinan lingvon. Inter la diversaj eventoj, li prelegis anglalingve ĉe Normala Universitato de Pekino pri “The Evolution of Responsible National Sovereignty”.



Ron GLOSSOP



Scott PAGE

Zamenhofa simpozio ĉe UN

Raportis Scott PAGE

La 15-an de decembro okazis UEA-simpozio ĉe 777 U.N. Placo por festi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de L. L. ZAMENHOF. Thomas ECCARDT enkondukis la prelegantojn kaj legis salutan leteron de la pola ambasadoro Andrzej TOWPIK.

La anglalingvaj prelegoj tuŝis diversajn temojn rilate al Zamenhof. Esther SCHOR, poetino kaj profesorino ĉe Princeton, parolis pri liaj judaj influoj, ekz. cionismo kaj hilelismo. Arika OKRENT, verkistino (*vidu intervjon kun d-ro Okrent, p. 16*) parolis pri Zamenhof kaj humileco. La psikiatro James LIEBERMAN traktis psikologiajn aspektojn de Zamenhof kaj lia estrecofilozofio. Timothy REAGAN, profesoro ĉe Centra Konektikuta Ŝtatuniversitato, parolis pri lingvokonstruado, kaj Humphrey TONKIN, emerita profesoro ĉe la Universitato de Hartford kaj eksprezidanto de UEA, parolis pri la testamentaĵo de Zamenhof.

Proksimume sepdek homoj ĉeestis, inkluzive de la ambasadoro de Benino Jean Francis ZINSOU, kelkaj ĵurnalistoj, regionaj esperantistoj, kaj aliaj interesitoj. Oni povas vidi la registritajn prelegojn ĉe <<http://esperanto-usa.org>>.



La speciala Guglo-emblemo kaj statistikajo pri vizitoj al la TTT-ejo de Esperanto-USA inter 15 nov. kaj 15 dec.

Guglo festis Zamenhof-tagon

Danke al instigo fare de esperantistoj tra la mondo, ankaŭ Google festis la 150-an naskiĝtagon de Zamenhof. Fojfoje la mondfama retserĉilo modifas sian emblemon por omaĝi diversajn festindajn datrevenojn, kaj je la 15-a de decembro, ĉekape de ĉiuj diverslingvaj Guglo-paĝoj aperis bunta emblemo kun litero "I" anstataŭita de verda standardo. Surklakintojn estis kondukitaj al paĝo pri L. L. ZAMENHOF en Vikipedio.


Ne surprize, subite venis ondego da intereso pri la flageto kaj Zamenhof. Laŭ statistikoj de Vikipedio, la paĝo pri Zamenhof kutime ricevas ne pli ol po 160 vizitojn tage. Je la 15-a, tamen, venis pli ol **781 000** vizitoj (*vidu sube*).

La atentigo pri la datreveno ŝajne vekis intereson ankaŭ pri Esperanto. La 16-an de decembro, TTT-estro Steve BREWER rimarkis subitan lavangon da vizitoj (proks. 7 000) al la retejo de E-USA (*vidu supre*). La 17-an, direktoro de la Centra Oficejo Bill HARRIS raportis: "Hieraŭ mi ricevis 97 informpetojn. Mi kutime ricevas 3 aŭ 4

tage. Multaj informpetintoj diris, ke ili sciis pri Esperanto dum longa tempo, sed [la sciigo de Google] instigis ilin lerni plu." Kaj la 23-an: "Dum la lastaj du tagoj mi ricevis mendojn de Amazon por entute 114 ekzempleroj de [la lernolibro de] Richardson."

Ankaŭ la TTT-ejo Lernu.net ricevis multajn vizitantojn – preskaŭ tro multajn. Laŭ estro Jevgenij GAUS, kvankam Lernu kutime ricevas po 5 000 unikajn vizitantojn tage, dum la 15-a alvenis pli ol 29 000. La servilo ŝajne transvivis, raportis li, "tamen mi devis kelkajn aferojn provizore malŝalti, por ke la tuto iĝu iom pli rapida. Esperanto-flago ne plu aperas ĉe Google, sed Lernu daŭre havas sufiĉe multe da vizitantoj."

Eĉ reagis konspirteoriistoj, ekzemple James LEWIS de la retgazeto *American Thinker*, kiu asociis Esperanton kun Sovetunio(!), kaj aludis ke Google partoprenas en konspiro (fare de Barack OBAMA kaj George SOROS, kompreneble) por trudi al la homaro stalinisman mondregistaron...



Vizitoj dum decembro 2009 al la paĝo pri L. L. ZAMENHOF en Vikipedio. Fonto: <<http://stats.grok.se>>.



Unitara Esperanto-ekspozicio

Raportis Nijl BLONSTEIN

La 4-an de oktobro ĉe Community Church en Novjorko mi ricevis spacon ekspozicii somerajn fotojn de la Universala Kongreso en Bjalistoko, KEF en Danujo kaj Svedujo kaj vojaĝo al Meksiko por renkontiĝo de UNO. Estro Bruce SOUTHWORTH partoprenis. Estro de la komitato por Unuiĝintaj Nacioj, George GARLAND ankaŭ vidis la fotojn, kaj speciale interesiĝis pri la partopreno en Meksiko. Ĉirkaŭ cent homoj vidis parton de la ekspozicio kaj dek detale rigardis la fotojn. ★

Senintenca esperantajo?



"Ho, ĉu *tiom* multekosta? Devas esti aparte luksa speco..." (Fotita en sud-kalifornia vendejo fare de Meja JUNA.)

Letter: Homaranismo and population

I doubt Zamenof knew about *The Principles of Population* by Thomas Malthus. In 1797 Malthus declared that misery and harsh conditions (e.g. poverty, conflict, disease, war) were necessary to avoid overpopulation and prevent the disappearance of civilization. There are three known cases of civilizations disappearing: in Guatemala, in Cambodia, and in the Easter Islands. I suspect that still undiscovered civilizations have disappeared in Brazil and Africa. These disasters were due to exhaustion of available resources as a result of overpopulation.


Birth control was developed in the 20th century, and developed countries have used it effectively. However the Third World does not have the education or resources to use birth control effectively. We need to develop and educate the Third World and empower women in order to stop rapid population growth.

Zamenhof created Esperanto to promote Homaranismo. We need to promote birth control in order to establish Homaranismo, as it cannot exist if harsh conditions are necessary to limit population growth.

I am searching for an Esperanto writer who would like to promote birth control in order to establish Homaranismo. I have been writing short papers on overpopulation since 1970 and have a wealth of information to share. It needs to be rewritten and translated into Esperanto, and I would like to have it published as a paper. If publicized, such a paper would be a great promotion for Esperanto.

— D. T. (Tom) Boisseau
<dantom21@gmail.com>

Study Esperanto in sunny southern California!



NASK

La Nord-Amerika Somera Kursaro
(The North American Summer Esperanto Institute)

June 27 – July 16, 2010

To be held at the University of California, San Diego ➔ UCSD

Instructors

Intermediate:

Katalin Kováts
Lee Miller

Advanced:

Grant Goodall
Orlando Raola
Amri Wandel
Duncan Charters

- ★ a beautiful ocean locale at a world-renowned university
- ★ intermediate and advanced levels
- ★ five college credits from the University of California
- ★ teachers and classmates from around the world
- ★ evening/weekend programs: music, talks, field trips and more!
- ★ single rooms with three meals daily
- ★ guest speakers and international exams
- ★ study before heading to the Universala Kongreso in Havana!

Scholarships available.

For more information, see: <http://esperanto.org/nask>

Or contact NASK coordinator: Ellen EDDY, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, USA
(360) 754-4563 • EddyEllen@aol.com

La Cseh-metodo

Probably the most famous and successful Esperanto teacher in history was Andreo Cseh (1895-1979). A Hungarian born and raised in Romania, Cseh learned Esperanto as a teenager and quickly became very active in the Esperanto community, among many other things helping found the Romanian Esperanto Center in 1922, the magazine *La Praktiko* in 1932 (which for many years he edited), and the Universal League in 1942 (best remembered for the monetary unit the stelo). Cseh (pronounced like the preposition *ĉe*) was ordained a Roman Catholic priest in 1919, but starting in 1924 he was permitted to devote himself full-time to Esperanto.

The Cseh method was originally the product of necessity. In 1920 a labor organization in the Transylvanian city of Sibiu invited Cseh to teach Esperanto to a group with no single language in common and no access to Esperanto textbooks. Cseh decided to adopt the direct method already becoming popular in Europe, teaching Esperanto in Esperanto by what he called not a course, but a conversation. The result was a remarkable success; soon he was being invited to teach all over Romania and then all across Europe. In 1927 the mayor of Stockholm and Prince Carl jointly invited Cseh to teach Esperanto there, including to the Swedish Parliament. The first book version of his course was published in 1929 by the Swedish Federation of Teachers.

So successful and enjoyable were Cseh's classes that they often had more students at the end than at the start: enthusiastic students passed on what they had learned to their families and friends, then brought



D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

dgary@mindspring.com

them along. Thanks to Esperanto's inherent traits and Cseh's approach to teaching, in just 20 two-hour sessions students would learn a vocabulary of about 700 words and essentially all of the grammar, enough to carry on simple everyday conversations. In the Esperanto press, people began speaking of a renaissance of the language.

There was such a demand for Cseh's courses that he began training other instructors. In 1930 he moved to the Netherlands and co-founded the International Cseh Institute of Esperanto (later the International Esperanto Institute) with the support of Julia and Johannes Insbrücker, major figures in the Esperanto community in their own right. More than 400 people have been trained in the Cseh-metodo over the years, including such famous names as Lidja Zamenhof, Julio Baghy, and Armin Doneis, one of the co-founders of ELNA (now Esperanto-USA). More than 50 certified Cseh instructors are active today, mostly in Europe (but only one, Arnold Victor of New York, in the U.S.). There's a list available online, at http://iei.nl/csehinstruistoj_espe.htm.

While becoming a full-fledged Cseh instructor requires formal training and certification, any Esperanto teacher can learn from Cseh's approach, starting with making the course as interesting and enjoyable as possible. Few of us have

Cseh's natural talents as a comedian, but we can all at least smile and embrace a spirit of fun. (See David K. Jordan's *Being Colloquial in Esperanto* for inspiration.)

Another key feature is teaching Esperanto directly in Esperanto. Cseh even considered it an advantage for the teacher not to know the students' language. A local helper could serve as interpreter during the first class meeting, but after that Cseh would employ physical actions, props, pictures, and the Esperanto the students had already learned. This required a well-thought-out course plan, which Cseh perfected over the years.

Anyone learning a spoken language needs to speak it as much as possible, but students are often reluctant to open their mouths for fear of making mistakes. Cseh solved that problem with a very old technique: Ask a lot of questions, mostly easy ones, and let everyone answer at once, in a chorus. In a Cseh class all the students speak almost as much as the teacher.

Cseh taught useful everyday words and phrases rather than the contrived school-book expressions (*la plume de ma tante est sur le bureau de mon oncle* and the like) then common even in direct method foreign language instruction. And characteristically he told a funny story about that:

Early in his teaching career, he said, he found that young women tended to drop out of his courses. When he asked them why, they complained that he didn't teach them how to say the things they wanted to say. He started leaving a bilingual Esperanto dictionary on a table so students could look up whatever they liked, and he paid attention to what they looked up. The first word young women wanted to know,

he found, was almost always *love*, so he made a point of introducing *amo* and *ami* very early in the course. From then on the young women stopped dropping out, and curiously enough, so did the young men.

There's far more to Cseh's method than can be covered in this small space. The best reference is the book *Baza Cseh-Kurso*, available from the Libroservo. *Saluton! Esperanto Aŭtodidakte* by Audrey Childs-Mee is a beginning Esperanto textbook entirely in Esperanto that was inspired by the Cseh-metodo and a good example of how to teach Esperanto entirely in Esperanto.

And this is a good time to mention that anyone interested in teaching Esperanto would profit from joining the American Association of Teachers of Esperanto, which automatically makes you a member of the Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj as well, including subscriptions to the quarterly magazines of both organizations. The cost is \$40 per calendar year, or \$20 for electronic delivery of both publications. See the website <<http://aaie.us>> for more information and a membership application. ★

Senintenca esperantaĵo?



"Nu, jes – po \$10.49 fonte estas kara... sed kion oni vendas?!" (Fotita en sudkalifornia vendejo fare de Meja JUNA.)

Dialektaj dilemoj

Ni relegu la tekston por la ĉi-monata defio:

“Guys like us, that work on ranches, are the loneliest guys in the world. They got no family. They don’t belong no place. They come to a ranch an’ work up a stake and then they go inta town and blow their stake, and the first thing you know they’re poundin’ their tail on some other ranch. They ain’t got nothing to look ahead to ... With us, it ain’t like that. We got a future. We got somebody to talk to that gives a damn about us...”

Ni ricevis ses tradukojn, de J.P., S.M., K.G., S.N., G.B., kaj E.L. Dankon al ĉiuj! Kaj efektive ĉiu alfrontis la problemojn de la teksto tre malsame. Al kiaj problemoj ni aludas? Nu, jen la vulgara familiareco de la lingvo, jen la provo redoni tre precizan usonan parolmanieron de aparta socia klaso en aparta tempo, jen esprimoj ne tre kutimaj (*blow their stake, poundin’ their tail*), jen duoblaj negativoj (*don’t belong no place, ain’t got nothing*).

Provoj redoni diversajn dialektojn malmultas en Esperanto. Ekzistas “La Mezepoka Esperanto” de Kalocsay kaj aŭdaca provo de Baghy pri ĉinakĉenta Esperanto en lia verko *La Verda Koro*. Tiuj provoj estas en si mem interesaj, sed ili ne estas multe sekvataj (nek, ni diru, tre sukcesaj). Plej ofte, ĉiuj roluloj en Esperanto-literaturaĵoj esprimas sin per tiu internacia, gramatike korekta parolmaniero, al kiu strebas Esperanto-parolantoj en la realo. Ĉar (ideale) mankas dialektoj en Esperanto, tial mankas ankaŭ dialektoj en la Esperanto-literaturo. Tio estas grava avantaĝo por komunikilo, sed eble malavantaĝo por literatura esprimilo.



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko Lee kaj Tim prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ili faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Bonvolu sendi ne plurajn diversajn provojn, sed **nur unu tradukon antaŭ la 10-a de marto** al:

bulteno@esperanto-usa.org

Pro tio, ke ne ĉiuj esperantistoj rekonas tiujn dialektojn, legantoj povas taksii iujn vortelektajn kiel senintencajn erarojn. Tio okazis, ekzemple, rilate la provon de George BAKER traduki la novelon *Uncle Remus* en Esperanton (*Usona Esperantisto* 2008/5, p. 15). Barbara PIETRZAK, reagante en rubriko de Pola Radio (*Trarigardo de la Esperanto-Gazetaro*, 2008-11-25), diris, “Estas iom bedaŭrinde konstati, ke tiom baza eraro kiel duobla neo, kaj do ekz. ‘ne diras nenion’, dume devigas flankenmeti la leg-aĵon.” Anglalingva leganto rekonas *ne diras nenion* kiel tradukon de *ain’t saying nothing*, kiu estas dialekta esprimo – la gramatika malĝustaĵo ne estas erara. Tio ne estas memevidenta al leganto kiu ne konas la usonanglan.

Do, kiel elturniĝi, tradukante *Of Mice and Men*? Interese – tralegante la provojn ni trovis pli da gramatikaj eraroj, ol kuinte. Ĉu intencaj aŭ senintencaj eraroj? Estis malfacile decidi.

“guys” Komence de la komenco, kion fari pri tiu ĉi tre ofta usona vorto? Tri el niaj tradukistoj elektis uzi *uloj*. Unu *tipoj* (ne konsilinde: ĉi tie ne temas pri “ideala modelo, prezentanta altgrade en si la karakterizajn ecojn de iu speco de personoj aŭ objektoj” – PIV2005). Kaj unu *viruloj*. (Ĉu tio estas pli bona ol simpla *uloj*?) Sed kio pri *knaboj, homoj, kamaradoj, kompanoj, kunuloj*... eble eĉ *buboj* aŭ *kanajloj*? Ni scivolas, tamen, ĉu ne ĉi tie la senco estas simple *viroj*. Kaj ni vere volas pensi pri la vortoj *vakero* kaj *gaŭĉo*... aparte *vakero*, kiu signifas “rajdanta gardisto de brutoj en Ameriko.” Sed ne, verŝajne la ranĉo de la rakonto ne estas tiaspeca ranĉo...

“...that work on ranches” La vorto *ranĉo* ja ekzistas en Esperanto. Tri elektis ĝin, tri elektis la vorton *brutbieno*. Sed la kalifornia *ranĉo* ne estas brutbieno, sed bieno en kiu oni kultivas legomojn (aŭ fruktojn). Ni kredas ke la PIV-a *grandbieno* vere taŭgas ĉi tie: “bieno [kampara posedajo, kun la agroj, ktp dependantaj de ĝi] tiel granda ke ĝi postulas gvidadon de specialisto kaj ekspluatadon per multe da laboristoj.” Ĝuste tiaj laboristoj estas George kaj Lennie en la rakonto.

“They don’t belong no place” Jen la diversaj esprimoj en la provoj: *nenie apartenas, ili ne apartenas al nenion lokon* (tiel), *senhejmaj, ili ĉehejmas nenie, nenie ili enhejmas*, kaj *ili ne apartenas al nenie*. Ĉi tie ni komencas vidi kelkajn uzojn de neregula gramatiko, eble por provi kapti la parolmanieron de la teksto. Laŭ ni, la senco estas “konstantan loĝejon ili ne havas”. Ni ŝatas *ili ĉehejmas nenie*.

“work up a stake” La provoj estis *gajnas monon, kondukas veton, ŝparas iom da, akumulas monerstakon, amasigas sumeton, kaj priparas monprovizon*. *Ŝparas iom da* estas

interesa elturniĝo. En laŭlibra Esperanto oni ne lasu *da* sen substantivo, ekz. *iom da mono*. Tamen oni tre ofte aŭdas *iom da* en la parola lingvo. Neniu pensis pri *gajni, enspezi, perlabori*, aŭ la tre bela *lukri*. Ni ne certas ĉi tie ĉu la ideo de *stake* rilatas al vetludo... povus esti tiel, sed laŭ la kunteksto ni taksas la signifon esti “gajni iom da mono per laboro”.

“blow their stake” *Malgajnas ĝin, eksplodigas ilian veton, malaperigas tion ĉi, pufelspezas la stakon* (bele!), *forfajfas la tuton, kaj fuŝas la monprovizon*.

“pounding their tail” rezultigis kelkajn diversajn provojn. *ili sklavos ree, ili ‘stas pistadas ilian voston* (tiel), *ili pugbatas al si, ili ŝovitegas la pugon, ili batas l’ voston*. Ĉi tie ni kredas ke oni ne povas laŭvorte traduki... la usonangla esprimo simple signifas “pene laboranta”. Internacia leganto ne certe komprenus la uzadon de *vosto* aŭ *pugo*... tial ni preferus *sklavi* aŭ *ŝovitegi*, aŭ simile, kvankam tiuj esprimoj estas malpli sukaj. Ĉu iu zamenhofa proverbo taŭgus ĉi tie, aŭ ĉu prefere ne miksi la mondojn de Zamenhof kaj Steinbeck?

“to look ahead to” *Por la estonteco, foratendi al, espero, anticipi, antaŭespero, antaŭĝui*.

“With us it ain’t like that.” *Plaĉa estas Kun ni, n’ estas tiel*. Kvankam la elizado de *e* el *ne* ne estas tute gramatika, ĝi ne kondukas al miskompreno. Fakte *n’ estas* estas ofte aŭdata en la parola lingvo.

“We got a future” Ĉefe oni uzis formon de *estonteco*. Unu uzis *esperon*, kaj unu *morgaŭon*. Unu uzis *futuron* – ni konsilu ke la *futuro* ne estas la *estonteco* en normala Esperanto... kaj niaj roluloj certe ne parolus tiel.

“We got somebody to talk to that gives a damn about us.” Ŝajne tiu ĉi frazo estis vere problemo, ĉar neniu el la provoj estis vere kontentiga. En la usonangla, *to give a damn* signifas “prizorgi, atenti, ami, ŝati”, kc. Oni ne devas traduki per la vortoj *damni, diablo*, aŭ simile. Kaj ĉi tie la *somebody* rilatas al la pli frua *guys* – ĉu ne kunulo, kompano, kamarado?

Jen provo al traduko iom sinteza, iom originala:

Viroj kiel ni, kiuj laboras en grandbieno, estas la plej solecaj en la mondo. Sen familio. Ili ĉehejmas nenie. Ili vagas al grandbieno kaj lukras monon, kaj poste iras en l’urbon kaj pufelspezas ĉion, kaj tuj ili ŝvite sklavas en iu alia grandbieno. Ili esperas al nenio. Por ni, n’estas same. Ni ja havas estontecon. Ni havas kompanion, al kiu ni parolas kaj kiu nin atentigas, por kiu ni estas pli ol nenio...

Por la nova defio, ni volas iom ŝanĝi la vojon, kaj proponi tradukon el Esperanto

en la anglan. *La Infana Raso* de William AULD estas konata kaj laŭdata, kvankam eble malofte vere legata... kaj jam ekzistas almenaŭ unu traduko en la anglan. Sed interesus nin vidi kion vi, karaj legantoj, farus pri la komencaj versoj de la poemo:

Saluton, masonisto, mia prapatro Ruben
kiu dum tuta vivo grimpadis supren-suben,
ĉizante sur preĝejoj gargojlojn kaj anĝelojn!

Kaj vin, ho posteulo de Ruben, kiu velojn
de karavelo hisis kaj sur la mar’ piratis
kaj la filinon duan de tavernisto svatis
kaj lasis ŝin graveda kaj malaperis tute
sur marofundon – kara, mi kantas vin salute!
(Kaj ankaŭ vin aparte, ho tavernistfilino,
avino mia praa, al kies mola sino
sin premis tiu filo, kiu en posta vivo
dediĉis sin al rabo, al murdo kaj lascivo,
kaj dek bastardojn patris, el kiuj unu iris
milite al Polujo, kaj tie vaste viris,
al sia semofluo malfermis larĝe kluzojn,
al mi testamentante milope polajn kuzojn!)



Traduko-interŝanĝo

Foje mi klopodas aperigi en la bulteno freŝajn tradukojn fare de alilandanoj kiuj enesperantigas verkojn nacilingvaj. Ljubov VONDROUŠKOVÁ estas rusino kiu edziniĝis kaj vivas en Ĉeĥujo, sed daŭre verkas en la rusa. La talenta ĉeĥa tradukisto Jaroslav KROLUPPER dividas kun ni la jenan poemon el ŝia verkaro. —Red.

Kion mi ŝatas

*verkis Ljubov VONDROUŠKOVÁ
elrusigis Jaroslav KROLUPPER*

Ĉion en la mondo mi ja ŝatas:
Kaj kvieton, kaj de ŝtorm’ tondradon,
Fulmobrilojn, kiuj nin ĉi gvas,
Stelojn, lumigantajn esplanadon...
De matenaj sonoj bataleto
Sin diskrete en sonĝad’ reflektas.
Dume la printempo el branĉetoj

La smeraldajn haroligojn plektas...
Jen: Naskiĝas de florad’ koloroj,
Laŭtan solon kantas kovkokino
Kaj siringa dolĉa bonodoro
Vestas laŭbon per florkrinolino...
Ĉion ĉi mi ŝatas... Kaj ne sonĝas
En novjara nokto kaj Kristnasko –
La terura manĝemulo ronĝas
Senkompatempon tuj post nasko. ★

Renkontu najbaron: Arika OKRENT

Dr. Arika Okrent is author of *In the Land of Invented Languages: Esperanto Rock Stars, Klingon Poets, Loglan Lovers, and the Mad Dreamers Who Tried to Build a Perfect Language* (Spiegel & Grau, 2009). Her book tells the colorful stories of a few of the many attempts at language creation over the centuries. Several chapters are devoted to her experiences learning Esperanto and her travels to national and international gatherings.

Your book seems to be getting a positive reception in Esperanto circles. How has it been received among your peers?

It's been received very well. I've heard from many linguists who said they always had a background interest in invented languages, or had built their own little collection of language books. I know of a couple of intro to linguistics classes that are using the book.

Are you still actively learning or using Esperanto?

No, I have to admit I'm not, but my passive reading skills are okay. Just call me an "eterna dependanto de vortaro."

Which other languages are you learning, and which do you speak fluently?

I'm not actively working on any new languages right now. Instead, I'm observing the language development of my children—though I'm not doing this in a real scientific way. Let's just say, I'm doing what I'm capable of doing with a 1-year-old and a 4-year-old at home! I would say I'm most fluent in American Sign Language, followed by conversational Hungarian, followed by Brazilian Portuguese. I'm hoping to get my son into a language immersion school (most likely Spanish) in



which case that will be the language I work on next.

In the book you mention some ideas for building your own language. Do you plan to develop these ideas any further?

Oh no. I thought about making my own language because I thought it might make a good narrative device for the book, but I quickly found out that I don't have that "spark" or "urge" that drives people to devote the necessary time to such a project. In the same way, I enjoy looking at paintings, but I have no desire to paint. That impulse isn't in me, and I wouldn't be any good at it without it.

Do you see any relationship between your fields of study [Linguistics and Cognitive Neuroscience] and invented languages?

Well, I wasn't thinking about any particular relationship between them when I started this project.

I think the reason invented languages aren't really looked at by those fields has to do with the "native speaker" problem. Linguists and cognitive neuroscientists want to investigate the rules of a language—not book rules, which may have

very little to do with how the language functions in real life—but internalized, mental rules, and the only way to determine what those rules are is through the judgments of native speakers. Otherwise, you introduce too much variability.

Using invented languages would make it very hard to come up with scientific controls for that variability. Of course, if an invented language has native speakers, like Esperanto does, you can use native speaker judgments, and there have been some studies of native Esperanto speakers. However, if you need to control for other factors, such as age, other languages spoken, etc., you end up with a very small pool of subjects. That said, if you could come up with a study involving invented languages that managed to control for variability in a scientific way and that shed some light on larger questions about the workings of the human mind, I don't see any reason why it wouldn't be well received.

What kinds of reactions did you get from other linguists when they discovered what you were studying?

I didn't get any really negative reactions, if that's what you mean. Maybe a little chuckling. One story that didn't make it into the book:

At the first Esperanto congress I attended, I sat down at the first talk with my husband, who was in the same linguistics program as me. Two rows ahead of us, I thought I saw one of our professors, Howie Aronson. "Is that Howie?" I asked my husband. "I'm not sure. It looks like him," he said. It was so unlikely that he would be there, in Cambridge instead of Chicago, and at an Esperanto congress, of all things.

The whole talk we sat there trying to get a glimpse of the side of his face. Finally, when the talk was over, we moved

up to where he was. Sure enough, it was him. I had no idea he was an Esperantist. It wasn't like he had been trying to hide it—I found out later it was common knowledge in the department—but I had never thought to ask about it. We met after that to talk about Esperanto and other invented languages, and he gave me great leads on where to find interesting history.

I think there may be more linguist-Esperantists than it seems. However, they are more likely to be the intellectually curious casual type of Esperantist than the "hard core" proselytizing type. Howie enjoyed Esperanto, but he would never think of trying to recruit anyone.

Your book has gained you a lot of fans among Esperanto speakers. How comfortable do you feel becoming an "icon"?

Wow. I'm flattered. And a little wary? I do sort of play both sides of the fence with respect to all the languages I discuss in the book. I go "inside" to get the real story, but I maintain my perspective as an outsider. And I suppose that's what I aim to be—an outsider with the inside scoop. I'm a person, out there in the world, who knows a bit about Esperanto and doesn't have a problem with it. That's not exactly being an active advocate or a spokesperson—which is what some might wish me to be—but I think it's ultimately a good thing for Esperanto.

Now that the book is out, do you have any further plans related to constructed languages?

I'm focusing on other things. I would say my true subject is the history of linguistic ideas. I'm not sure exactly what area I will land on next. There are a few possibilities, but I'm looking for the same feeling that inspired this book—the feeling of "I would like to read this book, but it doesn't exist... guess I'll have to write it." ★

krucvortenigmo

Unu solvinto ricevos \$10-rabaton ĉe la libroservo de E-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio (aŭ poŝte aŭ rete) antaŭ 25 feb. Bonan solvodon!

Horizontale

- 1 Katolika liturgi'
- 4 Mensa
- 9 Kembriga univ.
- 12 "___ ŝlosilo ĉiun pordon malfermas."
- 13 "Kiu tro bezonas, tiu ___ ne konas."
- 14 Een, en Eindhoven
- 15 Unua parto de la proverbo
- 18 Aliflanke de
- 19 #14 horizontale, angle
- 20 Bild' konstruita fare de la menso
- 23 Form' de la ekvatoro
- 27 Longa, unupeca vestaĵo
- 30 "June kaj ___" (devizo de TEJO)
- 32 "Kiu timas bestaron, ne ___ arbaron."
- 33 Pera aparato
- 34 Izolemul'
- 35 Eŭrazia mambest' kun stria kapo kiu dormas subtere
- 36 "Lupo sopiras, al arbaro ___ tiras."

- 37 Nurenburga neo
- 38 Vic'
- 39 Glanuj'
- 41 "___ kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas."
- 43 "Ne" en Nyíregyháza
- 45 Paperfoliet'
- 49 Dua parto de la proverbo
- 54 finaĵo de la TTT-adreso de #9 horizontale

- 55 Unika, sama: ___a
- 56 Kurba tenil'
- 57 Liven ___, kaŝnomo de Miguel GUTIÉRREZ
- 58 Diferenco inter debeto kaj kredito
- 59 Ĝi troviĝas inter Tet' kaj Kap'

- 3 "___ stomako ne lernas volonte."
- 4 Luma gas'
- 5 Frukto kern'
- 6 Transiri en staton
- 7 "Al feliĉulo eĉ ___ donas ovojn."
- 8 Mallonga sciig'
- 9 Id' de ĉevalino kaj virazeno
- 10 Malvira
- 11 Ŝ-sekva sinsekvo

Vertikale

- 1 Titol' de respekto
- 2 "Nin instruas ___o, kiun faras najbaro."

1	2	3		4	5	6	7	8		9	10	11
12				13						14		
15				16						17		
18							19					
			20		21	22		23		24	25	26
27	28	29			30		31			32		
33				34						35		
36				37					38			
39			40			41		42				
			43		44			45		46	47	48
49	50	51				52	53					
54				55						56		
57				58						59		

- 16 Eŭropa ____
(organizaĵo ekonomia)
- 17 Diri "ei" en Estonujo, ekzemple
- 21 Tranĉe; sagace; severege
- 22 Ŝmiris kun glua suko
- 24 Vorte harmonii
- 25 Legom' kies radiko akre gustas
- 26 Balanceti, ekzemple por dormigi
- 27 Endanĝerig'
- 28 Frukt' kiu liveras bongustan oleon
- 29 "Plej ____ ridas, kiu laste ridas."
- 31 anglalingva cifero havanta la saman sonon kiel #37 horizontale
- 34 Oficiale esploris
- 38 Malspertul'
- 40 "Mesaĝa" molekulo, grava en genetiko (mll.)
- 42 "Saĝa estas frato post ricevo de ____"
- 44 "mojosa": ____, juna, stila
- 46 Posedataj de tria persono vira
- 47 Hungaro RUBIK kiu kreis faman kubon
- 48 Ag' de tiu, kiu diras, "Je via sano!"

Solvo de la enigmo en № 2009/5

1	t	2	t	3	t	4	o	5	m	6	b	7	r	8	g	9	e	10	t	11	o
12	i	13	i	14	i	15	f	16	a	17	r	18	u	19	a	20	m	21	o	22	r
23	r	24	e	25	e	26	t	27	r	28	i	29	b	30	s	31	o	32	l	33	a
34	i	35	n	36	s	37	p	38	e	39	k	40	t	41	i	42	s	43	t	44	
45		46		47	o	48	d	49	o	50	k	51	e	52		53	s	54	k	55	i
56	a	57	v	58	i	59	d	60	e	61		62	k	63	o	64	d	65	66	67	a
68	p	69	i	70	k	71	i	72		73	s	74	i	75	n	76	77	78	79	80	h
81	r	82	a	83	s	84		85	o	86	k	87	a	88		89	s	90	91	92	i
93	o	94	n	95	o	96		97	l	98	a	99		100	p	101	t	102	103	104	m
105		106	v	107	e	108	t	109	e	110	r	111	i	112	n	113	a	114	115	116	r
117	s	118	a	119	l	120	e	121		122	o	123	o	124	o	125	p	126	127	128	e
129	u	130	r	131	i	132	n	133		134	l	135	o	136	g	137	o	138	139	140	i
141	m	142	e	143	n	144	u	145		146	o	147	k	148	u	149	l	150	151	152	k
153		154		155		156		157		158		159		160		161		162	163	164	165

- 49 Fel' tanita
- 50 Daŭre
- 51 Altnivela nobel'
- 52 "For ____ okuloj, for de la koro."
- 53 Necesiga sufiks'

La premiito de nia lasta enigmo estas **Briĉjo** (kiu petis, ke aperu nur lia propra nomo). Gratulon al vi, Briĉjo! Kaj laŭrojn al niaj aliaj solvintoj: George BAKER, Vilĉjo HARMON, Olga DU TEMPLE, Ellen M. EDDY, Keneĉjo GOLDBERGO, Lucas GRAVES, Kevin HAULK, Arlyn KERR, E. James LIEBERMAN, Peter MCCORQUODALE, Sandra MILLER, William PATTERSON, Ray REDD, Dave RUTAN, Jakobo SCHWARTZ, kaj Russ WILLIAMS.

Malgraŭ la lastatempe pli malfacilaj enigmoj, la nombro da solvintoj daŭre kreskas. Ĉu pro vintra inerteco? Ĉu pro tio, ke vi preferas defiojn, kaj sopiras al eĉ pli grandaj defioj? Hmm...

Ĉiukaze, via vigla partopreno varmigas mian koron en tiu ĉi plej malvarma sezono. Dankon, kaj bonŝancon! —Red.

Limeriko-rubriko

Russ WILLIAMS lastatempe verkis por ni fasketon de ĉarmaj limeriko-enigmoj. Ĉiu limeriko aludas al klasika usona filmo. Jen du el ili: ĉu vi povas diveni la filmojn?

- Virino tre bela kaj sveda
kaj viro kun fum' cigareda
piana ludisto
nazia rezisto
finfine ŝi estas tre ceda.
- Lin tedas la vivo vilaĝa.
Lin tentas do revo vojaĝa.
Rezigno pri celo,
savanta anĝelo,
edzino kaj ama kaj saĝa.

Solvaj aperos en la venonta numero...

New in the E-USA bookstore

All items listed here can be ordered online at <http://esperanto-usa.org/retbutiko> or by mail from Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530. More complete descriptions about can be found at our website. If a title is out of stock, you can request that the online bookstore notify you by email when the item becomes available. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



BONVENON EN NIA MONDO Bent JENSENIUS

Legolibro en facila Esperanto. En 27 ĉapitroj ĝi prezentas gravajn nuntempajn realaĵojn el la tutmonda Esperanto-movado. Riĉe ilustrita per fotoj kun pluraj utilaj informoj. En aldonajo uzante rol-ludojn ĝi instigas uzantojn pluevoluigi la parokapablon. Papera, 126 p. 2009. Ĉeĥujo. **\$21.30**



FUNTO DA LIBROJ POR PROGRESINTOJ

Unu funto da brokantaj libroj el la brokantajoj ĉe la Centra Oficejo. La kondiĉoj de la libroj varias de malbona al bonege. Prozo, poezio, Esperanto-movado, ktp. La plejparto konsistas el malgrandaj libroj, por ke vi ricevu diversajn legaĵojn. **\$3.00**



RIM-ENIGMOJ Elena POPOVA

If you're teaching your child Esperanto, this can be a good book to work on together. You can try to solve the puzzles while your child colors the pictures. Simplaj rimoj, kiujn oni kompletigu per mankantaj vortoj – besto aŭ floro, ĉielarko aŭ luno... Helpas la ĉarmaj ilustraĵoj de Miroslava TOMEČKOVÁ. Kun solvoj en 13 lingvoj! Papera, 52 p. 2009. Ĉeĥujo. **\$10.70**



GLUMARKOJ ZAMENHOF

20 stickers commemorating Zamenhof's 150th birthday. **\$4.60**



ESPERANTO – INSTRUMENTO DE FAKULOJ

16 articles in Esperanto, English, German and Czech. Kolekto de kontribuajoj prezentitaj dum la konferenco *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*, okazinta en Dobřichovice en novembro 2008. Papera, 133 p. 2008. Ĉeĥujo. **\$26.60**



MEKSIKA ETOSO Peter E. BROWNE

Poems about Mexico, written in both Esperanto and Chinese. En la antaŭparolo, MAO Zifu priskribas ĝin jene: "troviĝas la magneto de la kvar dimensioj kaj la sesa senso, kaj tuŝeblaj estas sunluma spirito kaj spuroj surskribitaj sur tajfuno." Papera. 137 p. 2008. USA. **\$10.00**



TEJO TUTMONDE

The official magazine of TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo). Published 6 times a year. Subscriptions run Jan. 1st – Dec. 31st. **\$16.00**



MEDICINA INTERNACIA REVUO

Official organ of the Universala Medicina Esperanto-Asocio. Approx. 58 pages (210x145mm) per issue. Two issues per year. **\$26.70**